HEJS

JUNULARA SEKCIO

HISPANA ESPERANTO FEDERACIO

REDAKTORINO: F-INO CARMEN NAVARRO

**Nro. 70 - 1971**

B. Barrena, 7 - 1.ª D. - BILBAO-6 (Hispanujo)



# B A B E L

*(Autoro: EDWARD A. STASACK)*

## LA DELEGITOJ

Mi deziras laúdi kaj danki per tiuj-ĉi paĝoj - la meriteman kaj sindoneman laboron de la delegita reto de U.E.A.

La oficio de delegito estas tre inda servo, -- kiu multe helpas la Esperantismon.

Mi povas ĉi-tion konstati, ĉar kelkefoje mi -- havis okazon uzi tiun ĉi servon, dum miaj vojaĝoj kaj ĉiam mi restis tre kontentigita kaj ----- dankema.

Tiuj homoj (kiuj tre sindoneme labôras) bone - scias kion signifas esti vere esperantisto, kion estis la Interna Ideo de nia majstro kiu ne kreis Esperanton por ke ni havus alian plian lingvon sed tute kontraúe, unu Internacian Lingvon per - kiu ĉiuj homoj povus kompreni kaj ami sin, unu la alian kiel veraj fratoj.

Estas granda diferenco inter "esti esperantisto" kaj "paroli esperanton" tial, mi ne povas konsenti kun tiuj homoj kiuj nur limiĝas paroli nian lingvon, aú utiligi ĝin nur por sia propra profito.Esti esperantisto signifas multe pli ol tio.

En nia lando estas malmultaj Delegitoj de UEA. kaj precipe rilate al J-Delegitoj (nur 3). Tial - mi deziras instigi ĉiujn junajn individuajn membrojn de U.E.A. kiuj vere sentas sin aktivaj esperantistoj kaj kiuj deziras entuziasme labori pro nia Idealo, fariĝi J-Delegitoj en sia urbo (se ankoraú ĝi ne eksistas) kaj lia helpo al la Esperantismo estos ege valora.

Sed ne nur la junulaj, ankaú la plenaĝaj membroj de U.E.A. povas, kaj fakte devas, kunlabori; ili povas esti Delegitoj, aú se tiu jam ekzistas, ankaú ili povas esti Fak-Delegitoj en tiu fako pri kiu ili kompetentas pro sia laboro aú emo. Mi finas same kiel mi komencis: dankante kaj aplaúdante tiun noblan taskon: Delegito de U.E.A.

MARI JOSE

# VORTOJ

Paroli, kanti, preĝi, helpi,
ridi, ami, vivi, libertempi,
paŝi, lerni, labori BLANKA.

Ĝenon, egoismon, vegetadon,
diputon, indiferentecon,
kritikon, brutigon, nuligon,
monon, laúdon, enalkoholiĝon,
miismon, hipokritecon, flir-
ton, beaton GRIZA.

Ploro, krio, sufero, malsa-
to, sakro, kondamnito, dro-
go, milito, teruro, memmor-
tigo, sklaveco, morto, ente
rigo, NIGRA.

BLANKA = Kion ni deziras

GRIZA = Ni faras sendirante

NIGRA = Kiu kulpas pri tio?

ROSALIA

## .- NE FORGESINDAJ TRAVIVAĴOJ -.

Pasintan vintron, okaze de futbalmaĉo inter la teamo "Athletic de Bilbao" kaj la ĉeĥa teamo "Sparta de Praha", vojaĝagento en Bilbao organizis interesan kvar-tagan "ekskurson" al la ĉeĥa ĉefurbo por vidi tiun spektaklon.

Profitante tiun okazon mi aliĝis al la ekspedicio: Pere de moderna jeto ni ekflugis el Sondika (Bilbao'a flughaveno) kaj post 2,10 horoj da belega aervojaĝo ni atingis Pragon. En la flughavenhalo el tiu urbo mi ricevis unu el la plej memorindaj surprizoj ĉar en tiu loko atendis min tri ĉeĥaj geesperantistoj, unu el ili estis mia kara korespondanto S^a Blaźoz, el Česká Trébová.

Post laso de mia valizo en la hotelo, la simpatia S-ino Lydia, oficistino de la ĉeĥa E-asocio kiu akompanis min, petis ke mi ĉeestu E-Kunvenon en ilia klubo. Plezure mi konsentis kaj denove ili surprizigis min ĉar en tiu kunvenejo estis pli da cent homoj. Post la koncernaj prezentoj kaj salutoj mi estis devigata respondi multe da demandoj pri la E-movado en Hispanio. Certe mi estis tre nervoza pro la emocio atestante la mirindan kaj amikecan etoson kiu estis inter la ĉeestantoj.

Sekvintan matenon S^a Blaźok akompanis min kaj li montris al mi la malnovajn kvartalojn. Certe estis tre interesa vizito precipe pro ĝiaj belegaj antikvaj konstruaĵoj. Mi ne devas forgesi la sveltajn kaj ĉarmajn junulinojn kiuj laŭ mia opinio estas la plej vidindaj "monumentoj" el tiu urbego.

En la hotelo kelnero transdonis al mi telegramon pere de kiu S-ino M. Ginzlová, korespondantino mia, kiu loĝas pli da 200 kmj. malproksime Praga, petis ke mi atendu ŝin estontan Pragajn lokojn, la ĉefa Kastelo, la fama Dia Infano de Praga, K.t.p.

Kvankam la futbalmaĉon ne estis favora al la Bilbao'anoj certe mi revenis al mia urbo tre ĝoja pro la feliĉaj tagoj kiujn mi travivis kun miaj ĉeĥaj geamikoj. La plej nedezirinda momento okazis kiam mi estis devigataj adiaŭi unu la aliajn, mi estis tre kortuŝita kaj preskaŭ malsekiĝis miaj okuloj pro emocio. Ne, neniam mi forgesos Pragon kaj estonte mi esperas revidi ĝin kaj miajn ĉeĥajn geamikojn.

MIKAELO



Ke la Eternulo plimultigu miajn pulojn, se tio kion mi kontos ne estas la vero, nur la vero, kaj nenio pli ol la vero. Amen'.

Amiko, kiu sendube volis scii, ĉu mi estas moderna viro, donacis al mi invitilon, por viziti lastmodan dancejon. Verdire tia vizito ne multe allogis min, sed la scivolemo kaptis min, kaj, mi iris tien.


Malferminte la pordon de la klubo, mi pensis: - eble erare mi eniris alian lokon. Bruo kiel tiu de kreskanta tondro atakis miajn orelojn, sendube, mi - ripetis, mi eraris, ĉi-tie estas la Metereologia Lernejo; kie oni alkutimigas la lernantojn aúdi bruadon de ŝtormoj kaj uruganoj.

Sed ne, mi estis enirinta la ĝustan lokon. Kiam miaj okuloj adaptiĝis al la preskaú mallumeca salono, mi tuj komprenis la kaúzon de la surdiga bruo. Sur - malalta podio en la fundo de la salono, kvin longharuloj entuziasme kaj senlaĉe ludis gitarojn kaj tamburojn. Rigardante ilin, mi komprenis kial, filoj de hartondistoj ne povas studi karieron, kaj post ne longe eble, eĉ manĝi tomatan salaton, se tia longhara modo progresas.

Bone, ĉi-tio estas alia afero, kiu nevole venis en mian meson, ĉar mi nur intencis pritrakti muzikon. Jes, muziko, almenaú oni diris al mi, ke tio kion mi aúdis ricevas tian nomon, kvankam en la unua momento mi kredis, ke ĝi estis la murmuroj de la ĝangalo. Feliĉe (almenaú por li) Bethoven mortis antaú multe, - kaj ne havis okazon ĝui pop-muzikon.

Ankoraú mi sidigis min, kiam eksonis (pli bone eksplodis) hororan krion, unu el la longharuloj konvulsie prenanta mikrofonon kantis (laú mia persona opinio) leonblekis.

Kredu min, kara leganto, se mi ne estus restinta kvazaú sraúbigita de la teruro al la planko, mi estus forkurinta ĝis Nepalo, neniam mi estis pli proksima -



al kolapso ol tiam. La aliaj muzikistoj plenpulme aliiĝis al la koncerto !Ho katastrofo! korvoj kaj ŝafoj ĥore arigitaj ne kantus malpli bone el ili.

Krome ili moviĝis ĉiuflanken kiel gumpupetoj, do mi ekkriis !Eureko! mi jam trovis la kialon de tia agado! epilepsio tio estas! epilepsio.


Bedaŭrinde tiel luma diagnozo rapide vaporiĝis, ĉar la ĉeestantaro dancante, ĉirkaŭ la muzikistoj moviĝis sammaniere. Do, ne povas esti; ĉu ili ĉiuj malsanaj, kaj mi nur la sola sana persono inter ĉiuj? Tute ne.


Ĉerbumante pri la problemo, mi atingis la jenan konkludon; Jozefo vi estas tiu kiu ne bone funkcias, vi estas la ununura strangulo.

Post tiu lasta kaj trista pripenso, stumblante, kun klinita kapo, mi forlasis la dancejon.

De tiam, mi vizitas ofte la Pskiatra-Doktoron kaj mi ye-yeas kiel iu ajn.

JOZEFO





Se vi libertempas, ne forgesu enmeti esperantan libron en via valizon. Legu esperanton sub la suno estas sana kaj kulturdona.



Karaj H.E.J.S.anoj:

Kiel vi fartas?

Mi kun granda ĝojo salutas al vi el mal proksima lando Japanio.

Dank'al mia amikino en Bilbao mi legis la organon de H.E.J.S.

Kaj mia amikino proponis al mi skribi etan raporton de mia vojaĝo, sur via gazeto.


Post la 54a U.K. en Helsinki mi vojaĝis sola en Europo, orientaj kaj okcidentaj landoj. Ja, eĉ nun mi rememoras agrablajn tagojn dum mia vojaĝo. Kaj mi pensas ke se mi ne estas esperantistino!.....

Tio estas tre grava, ĉar se ne, mi ne intencis vojaĝi eksterlandon.

La vojaĝo donis al mi multajn fruktojn en scio kaj sperto, kiujn mi ne povis akiri enlande.

Jes, nun mi povas rekomendi al gejunuloj ke ili vojaĝu en aliajn landojn. Kaj mi kredas, certe la rezultato estos granda.

Fine mi deziras grandan sukceson al H.E.J.S. kaj multe da danko al ĉiuj kiuj por mi faris gajan kunvenon en Bilbao.



Amike via

Kazue Sugawara

## DEZIRAS KORESPONDI

YLONKA PETER
Figarete, 27
S.F. GHEORGHE
(RUMANIA)

PETHO ZOLTÀN
Tata II AGOSTYANI
UT 43. HUNGARIO

LENA Bańkowska
Krapkowice, 3
Woj. Opolskie
Poste Restante
POLONIA = POLSKA

## NIA GRUPO

Antaŭ kelkaj tagoj, la Grupo de Bilbao, festis la fino de Esperanta Kurso.

La "jusbakitaj" agis proksimaj maturaj ge-esperantistoj legantaj versojn, salutante en Esperanto kaj parolante, se ne flue, almenaŭ tre kuraĝe.

Ilia profesoro estis gratulata de la ĉeestantoj kiuj konstatis la valoron de longa penado dum la tuta kurso. Poste, pere de vespermanĝeto finiĝis la festo.

Estu bonvenintaj, novaj esperantistoj!!

## N E N I O

Piedparolante per arĝenta kubuto, Petro atingis sian vizaĝon laú la gepatra kutimo.

– Nenie oni kriis tiel naze en vintra somero kaj ankaú ne la maŝinoj promenis ~~mal~~dekstren kaúze de mirindaĵo, ĉar ŝafino ena miĝinta lernas pli bone ol lama perono.


Sed ne ĉio brilanta estas kotono; ne, – tute ne! rimarku ke kotono, kaj pro tio neniel bastono estos urbestrino; tamen, se vi posedas leonarbon.... despli bone.... vendu ĝin kaj aĉetu dupiedan bovinon.

Kaj vi? Jes, mi klopodas langigi lacerton, kronojn kaj eĉ vagonaron, fue en la mateno.

Kial vi ne helpas vanelon? Penu, rene – penu, penadu.... Finfine, la ĝirafo mortis.. Kia bedaúro! Kia bedaúro!

RIFO

NOTO.- Se via kunlaboro daúras tiel malmulta kiel ĝis la momento, aperos en – nia revuo similaj "artikoloj".



## ĈU VI DEZIRUS VOJAĜI AL EGIPTUJO?

Ekzistas en Bilbao la Asocio por la Uniĝintaj Arabaj Studentoj. Ili estas junuloj el la Mez-Orientaj landoj, kiuj ĉiufoje en pli granda nombro alvenas nian urbon por realigi superajn studojn, plej multe el ili en la branĉoj de Inĝeniero kaj Medicino.

Ni diras "unuiĝo faras forton" kaj ĝi estas certe. Kion sendepende ili neniam estus atingintaj nun estas realeco. Pri kio temas? Do, pri vojaĝo al Egiptujo, por ke malmulte da nomo, grupo de hispanaj studentoj povos ekkoni la landon de la piramidoj kaj enpenetri la sekretojn de unu el la plej antikvaj civilizacioj de la Tero.

Ĝi estos ŝipveturado, forirante el Barcelono por reveni al la sama haveno 15 tagoj poste. Longe de la vojaĝo oni haltos en diversaj mediteranaj havenoj.

Estas antaŭvidita eĉ intervjuo al la Egipta Prezidanto Annuar El Sadat kaj, komprenneble, kelkaj turistaj kaj kulturaloj vizitoj al plej tipaj lokoj de tiu granda jarmila lando.

La Ambasado de la R.A.U. en Hispanujo nome kunlaboris kun la Asocio, cele ke la prezo kiun pagos la junuloj, estu plej eble malmultekosta kaj preskaŭ atingeblа de iu ajn nezpoŝo. Entute 10.000 ptoj. kaj la nombro da studentoj kiuj povos profitiĝi el tio, estos maksimume 50.

Feliĉan vojaĝon.

\+ \+ \+ \+ \+

MEYCO

Ni ricevis leteron de HEJS-membro en Svislando Sro. Armando Alvarez, kiu inter aliaj temoj, rilate al nia revuo li faras "kritikon". Ĉar ni opinias ke ĝi estas interesa, litere ni transskribas liajn vortojn. "Unu el la difektojn kiujn ni trovis estas ke ĝi ŝajnas direktita ekskluzive al bilbaoanoj, ĉar estas pri ili, pri kiuj oni parolas. La revuo estas destinata al la hispanaj esperantistoj, tial mi pensas, ke ne nur oni devas paroli pri Bilbao kvazaŭ ĝi (la revuo) estus "regiona ĵurnalo", ĝis ĉi tie liaj vortoj.

Nu, kvankam ne tute (ĉar la revuo, ne nur temas pri Bilbao, sed ankaŭ pri multaj diversaj temoj) iomete li pravas, sed ankaŭ ni pensas ke tio ne estas nia kulpo.

De kiam la sidejo de HEJS estis translokita al nia urbo, ni ricevis nenian kunlaboron el la ceteraj hispanaj grupoj; tial, la revuo estis tute redaktita de la gejunuloj de nia grupo. Do, estas normale se ni parolas pri eventoj okazintaj en Bilbao, ni ne povas doni sciigojn pri Madrido, Barcelono, aŭ aliaj urboj ĉar, se neniu ilin sendas, ni ilin ne konas.

Antaŭ kvar monatoj, ni sendis leterojn al ĉiuj grupoj petante kunlaboron al ĉiuj kaj speciale al la gejunuloj, sed bedaŭrinde ni devas diri ke ni nur ricevis unu respondon, Sro. Jaime Molera, el Moyá (Barcelono) kiu ekde nun estas reprezentanto de HEJS en sia urbo.

Do, denove ni petas kunlaboron; ni bezonas artikolojn novaĵojn, sciigojn ktp. el vi ĉiuj; ni deziras ke nia revuo estu vere la "voĉo" de ĉiuj hispanaj esperantistoj kaj ne nur "regiona ĵurnalo". Kompreneble, ankaŭ niaj eksterlandaj membroj povas kunlabori, se ili estas tiel ĝentilaj, pere de siaj raportoj, sciigoj ktp. el siaj landoj.

Ni bedaŭros fari tion, sed en la venontaj numeroj de la revuo, ni restigos uno paĝon neskribitan, kiam ni ricevu nenion el la ceteraj hispanaj grupoj.

La Estraro

ALVOKO DE KOMENCANTO

Karaj geamikoj:

Ni vokas vin ĉar mi kredas ke vi, kiuj jam
as esperantistaj vi povas kaj devas realigi
gravan laboron je komunikado kaj propagan-
ĉiu esperantisto scias la gravecon kiu enha
nian lingvon kaj la plezuroj kiu donas al
kiu havis la sorton partopreni de tiu ĉi -
nda donaco de D-ro. Zamenhof.

Mi [illegible]iras tion, mi kiu nur antaŭ ses monatoj
ernis Esperanton kaj mi jam ĝuis iujn el ĝiaj
ntaĝoj.

Ni ĉiuj estas konsciaj ke la homaro bezonas
preni sin. Ekzistas frazo "ne diru ke la mon
devas esti pli bona" faru ĝin.

Vi, kiuj havas en viaj manoj internacian ko
ikilon, ne kaŝu sed uzu ĝin.

Tiu ĉi estas mia alvoko kaj peto al vi: pro
andu la lingvon inter viaj familianoj, amikoj,
ĉiu kiu povus aŭskulti vin.

Mi estas certa ke se vi ĝin faras tiel en ve-
taj kursoj estos novaj lernantoj allogitaj de
al lernado de Esperanto, kaj tio estos por vi
ivo de intima plezuro.

Dankon kaj ĝis la revido.

MIAU

# HUMORA-ANGULO

PSIKIATRIO

Post longa restado, pensiulo estas preta forlasi la frenezulejon, kaj la directoro diras al li:

-Nun, vi jam konscias ke vi ne estas Napoleon, ĉu vere?

-Jes, sinjoro, respondas la adiaŭanto, sed diru al mi....

-Kio okazas?

-Ke mi esperas, ke mi ne estos devigata pagi la nutranpension de Josefina.

KOMPENSO

Akceptinta sian filon, junulo ĵus edziĝinta, la patro -sinjoro tro arkaika- demandas al li kun malplaĉa mieno:

-Oni diris al mi, ke vi helpas vian edzinon frotlavi la teleraron, post la manĝado. Ĉu tio estas vera?

-Jes, paĉjo, respondis la filo iom hontigita. Sed tuj li fiere levas la kapon kaj klarigas:

-Sed ŝanĝe, ŝi helpas minfrotlavi la ŝtofojn.

J. SANTAMARIA

FELIĈAN LIBERTEMPON AL ĈIUJ!

Paco J.


C

MADERAS
CALLAU

Sans, 302 - Teléf. 239 05 24
BARCELONA (14)

jovani

instalación
restauración
reparación

juegos electrónicos, futbolines, billares,
billarines, etc.

instalación sin
ningún gasto para
el cliente

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83
HOSPITALET - BARCELONA

ZURCIDORA
y
TEJEDORA
ROSITA GALBANY

Sans, 292, bajos
Teléf. 230 29 41
BARCELONA

VENDO RETALES

*para falda o pantalón*
*directos de fábrica*

J. Cardellach

C. Salvatierra, 99
TARRASA